Theodor Storm,

Estas flustrado

tradukita de Manfredo Ratislavo

Flustradon dumnokte ekaŭdis mi,
Min estas maldormiginta ĝi;
Mi sentas: sciigi sin volas io,[2]
Sed vojon al mi ne trovas tio.

Ĉu estas amvortoj blovitaj for,
Al vent' konfiditaj dum nokta hor'?
Ĉu estas ĝi iu estonta malbono,
Premanta sin urĝe al mia ekkono?

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Flüstern" de THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983.*

Arg-176-356 (2004-02-23 22:13:39)

[2] aŭ:
Jen volas sin io al mi sciigi,
Sed ne kabablas sin komprenigi.